



Universala Esperanto-Asocio

## Jara Raporto: Rilatoj kun UN kaj Unesko en 2022

### 1. Enkonduko.

La historio de Esperanto ĉe UN kaj ĝia instanco Unesko komenciĝis preskaŭ samtempe kun la fondiĝo de tiuj organizoj. Jam en 1947 Universala Esperanto-Asocio deklaris, ke la homaj rajtoj estas “esenca kondiĉo” por la laboro de la Asocio, kaj tion enskribis en sian statuton. En 1950 ĝi prezentis petskribon al UN koncerne la utiligon de Esperanto, kaj tio, per iom nereкта vojo, kondukis al rezolucio favora al Esperanto fare de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1954 kaj al starigo de konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko. Sekvis ekesto de similaj rilatoj inter UEA kaj UN. De tiam ĝis hodiaŭ la kunlaboro daŭras – tra preskaŭ 70 jaroj.

La formoj de kunlaboro variis tra la jaroj. UEA partoprenis kunvenojn de UN kaj Unesko pri temoj de komuna intereso, subtenis rezoluciojn, ricevis subvenciojn por aperigi librojn pri temoj UN-rilataj, bonvenigis funkciulojn de UN kaj Unesko en siajn kongresojn, kaj intertraktis kun funkciuloj. Ĝi ankaŭ utiligis la strukturojn de UN kaj Unesko por starigi kontaktojn kaj kunlaboron kun aliaj neregistaraj organizoj.

Ne eblas ĉi tie doni kompletan bildon pri la multflanka laboro. El la historio eble sufiĉas mencii la faman Unesko-rezolucion de Montevideo de 1954, la petskribon prezentitan al UN en 1966, la vizitojn de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al la Universala Kongreso de 1977 kaj de la Asista Ĝenerala Sekretario de UN al la UK de 1979, la rezolucion de Unesko en Sofio en 1985 – aŭ, pli lastatempe, publikigon en 2020, kiel komunan projekton de Unesko kaj UEA, de volumo pri la historio de Unesko, kaj (eĉ pli signife) regulan aperigon, en kunlaboro kun la Ĉina Esperanto-Ligo, de la *Unesko-kuriero* en Esperanto.

La longa kaj fidela kunlaboro estis realigata de longa kaj fidela linio de kunlaborantoj: Ivo Lapenna, Jean Thierry, Emmanuel Chicot, Akiko Nagata, Mark Starr, Julius Manson, Elizabeth Manson, Ralph Harry kaj aliaj pioniroj, ĝis aro da homoj kiuj nun kaj lastatempe aktivas sur tiu tereno en Novjorko, Ĝenevo, Parizo kaj Vieno. Hodiaŭ tiuj kunlaborantoj ne nur intervenas en kunsidoj, verkas raportojn k.s., sed funkciigas retejon, aperigas informilon, prizorgas oficejon en Novjorko, kaj kunlaboras kun aliaj organizoj kiuj interesiĝas pri komunikado kaj komunikaj problemoj en la sino de la internaciaj organizaĵoj.

La nuna raporto prezentas skizon de tiu laboro.

## 2. Niaj Kunlaborantoj

La Asocio laboras unuavice per teamoj en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno (ĉe UN) kaj Parizo (ĉe Unesko). Humphrey Tonkin kunordigas la UN-laboron kaj François Lo Jacomo kunordigas la laboron ĉe Unesko. En Novjorko, aldone al Humphrey Tonkin, Francis M. Hult reprezentas UEA en kunsidoj de UN kaj samtempe prezidas la Komitaton de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj (CoLL). Tiu Komitato estas unu el la konstantaj komitatoj de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO), kaj CoNGO siavice reprezentas la interesojn de la neregistaraj organizoj (NROj) en formalaj rilatoj kun UN. UEA estas ankaŭ estrarano de CoNGO, elektita de ties membraj organizoj. En tiu rolo ĝi aktivis en la interesoj de NROj antaŭ UN, partoprenas kaj foje kungvidas kunsidojn de CoNGO, kaj interrilatas kun funkciuloj de UN. Vidu pliajn detalojn sube.

En Ĝenevo grupo de ses homoj, sub gvido de Cesco Reale, prizorgas la kontaktojn. Aliaj membroj estas Alain Favre, Alessio Sacha Giordano, Mireille Grosjean, Nicole Margot kaj Adrian Tanner. En Vieno trimembra grupo laboras: Hans-Michael Maitzen, Alfred Heiligenbrunner kaj Norina Florineth. Alfred Heiligenbrunner estas vica sekretario de la Komitato de NROj pri Paco, plia konstanta komitato de la jam menciita CoNGO.

En Parizo, la teamo ĉe Unesko, gvidata de François Lo Jacomo, laboris ĉefe, en 2022, por sukcesigi aranĝon iniciatitan en 2019 de trideko da pac-organizoj partneraj de Unesko, por festi la Internacian Tagon de Paco per kantoj de tutmondaj korusoj. Esperanto estis unu el la kvar laborlingvoj, partoprenis multaj Esperanto-korusoj kaj UEA subvenciis la venigon de Internacia Esperanto-Koruso gvidata de Zdravka Boytcheva en la surlokan eventon, la 17an de septembro en Toloso (Eŭskio, Hispanio). Pluraj filmoj raportis pri ĝi. UEA subvenciis ankaŭ la 13an Forumon de Neregistaraj Organizoj ĉe Unesko, la 21an kaj 22an de novembro en Otavo (Kanado), en kiu Mark Fettes kaj Francis Hult prelegis, enkonduke al la Internacia Jardeko pri Indiĝenaj Lingvoj.

La Asocio havas sian propran retejon pri UN-aferoj, [esperantoporun.org](http://esperantoporun.org), kiun prizorgas Rafael Lima. Rafael Lima, siavice, ankaŭ pretigas mesaĝojn kiujn UEA sendas al UN kaj al NROj okaze de specialaj festoj de UN, kaj ofte pretigas tiurilatajn afiŝojn en Esperanto. Humphrey Tonkin redaktas, ĉiun duan monaton, informilon sendatan al listo de UN-funkciuloj, NROj, esperantistoj kaj aliaj. Gilles Tabard tradukas ĝin en la francan, tiel ke ĝi aperu en tri versioj: Esperanto, angla, franca. Sofija Soskina (Novjorko) respondecas pri la dissendo de la informilo al la listo de ricevantoj.

Defore, pluraj homoj kunlaboras pri specifa agado. Tuta aro da homoj kontribuis al lastatempa libreto eldonita de Mondial (sub gvido de Ulrich Becker) nome de UEA kaj sub redakto de Rakoen Maertens kaj Humphrey Tonkin. Tiu libreto sur cent paĝoj prezentis la 17 Celojn por Daŭripova Evoluigo: ĝi estis distribuita senpage okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo kaj estas havebla de la libroservo de UEA kaj en reta formo. Grupo de homoj sub gvido de Renato Corsetti, eksa prezidanto kaj komitatano de UEA, okupiĝas interalie pri la Tago de la Gepatra Lingvo, kiun oni festas ĉiujare en februaro; Sara Spanò, en kunlaboro kun la ĝenerala Direktoro de UEA, prizorgas la formalaĵojn de nomado de reprezentantoj de UEA ĉe UN; Anna Bennett gvidas virtualajn rendevuojn de grupo pri virinaj aferoj; Rakoen Maertens kaj Francesco Maurelli rolas kiel laŭkazaj konsilantoj.

En sia januara numero de 2022, la Revuo *Esperanto* prezentis superrigardon de la agado ĉe UN en 2021. La nuna raporto celas plusekvi tiun laboron tra la jaro 2022. La sama numero enhavis ankaŭ raporton (kaj tekston) pri parolado de François Lo Jacomo antaŭ la 41-a Ĝenerala Konferenco de Unesko (Parizo, novembro 2021), kiu vokis al evoluigo de “nova speco de aŭskultado de la aliaj” –

fundamenta principo de la agado de UEA ĉe internaciaj organizoj: ni (t.e. la homoj ĝenerale) kutimas paroli en niaj respektivaj lingvoj – kaj plendi, ke la alparolatoj ne komprenas nin; indus lerni aŭskulti la aliulon, kiu estu nia partnero en kreado de pli bona kaj daŭripova mondo.

Ni menci, ke la interveno en Unesko rezultis el aktiva partoprenado de kvinpersona delegacio de UEA (aldone al F. Lo Jacomo: Nathalie Kesler, Didier Loison, Gilles Tabard kaj Renée Triolle) – plia ekzemplo de esenca elemento en nia agado: ni celas labori per ekipoj, per kunlaborado inter interesataj homoj. Ankaŭ en la Internacia Konferenco de NROj ĉe Unesko, de la 14a ĝis la 16a de decembro, UEA partoprenis kvinope (François Lo Jacomo, Barbara Despiney, Didier Loison, Renée Triolle kaj Martine Demouy). François Lo Jacomo kaj Barbara Despiney kandidatigis UEA al la Ligkomitato de NROj ĉe Unesko, sed la regularo de tiu ĉi baloto lasas neniun eblon por eŭropaj asocioj, kiuj ne jam respondecas pri unu el la kernaj agadoj de la Ligkomitato. Ni danku al Barbara Despiney, kiu post pli ol kvardekjara agado en la UEA-teamo ĉe Unesko, decidis ne plu daŭrigi en 2023.

Esperable la nuna raporto montros, ke tia teama laboro estas fundamenta kialo de niaj ankoraŭ limigitaj sed efikaj sukcesoj.

### 3. Niaj celoj

Ne estas surprize, ke, kiam oni unue, antaŭ jarcento, proponis al la Ligo de Nacioj utiligon de Esperanto, oni ĉefe celis trarompi per neŭtrala lingvo la rivalecon inter la lingvoj plej ofte uzataj en internaciaj intertraktoj, kaj ankaŭ instrui Esperanton en la lernejoj. Premiso de tiu argumento estis la supozo, ke la internaciaj gvidantoj frustrigas pro tiu rivaleco kaj serĉas solvon.

Sed en praktiko montriĝis, ke neniuj el la ĉefaj lingvoj pretis cedi sian rolon al Esperanto. Vidante la mondon el naciisma vidpunkto, oni ne emis akcepti internacian (kaj sekve egaligan) normon. Ankoraŭ hodiaŭ la diplomatoj de la diversaj ŝtatoj kaj eĉ la oficistoj en la diversaj UN-sidejoj plejparte ne pretas cedi sian pozicion: ili aŭ estas denaskaj parolantoj de unu el la ses lingvoj de UN (kaj precipe la angla kaj la franca) aŭ ili elspezis amason da energio por kleriĝi en tiuj lingvoj: ili ĝuas avantaĝon kiun ili ne estas pretaj tuj cedi. Ili ne rekonas, aŭ preferas ne rekoni, la simplan fakton ke egaleco de lingvoj estas afero de homaj rajtoj, same kiel nediskriminacio inter la rasoj aŭ seksoj estas afero de homaj rajtoj. La diferenco? Nu, oni povas eviti rasan diskriminacion per senpartia pritrakto de ĉiuj homoj, senkonsidere pri raso – sed oni ne povas simple senpartiece nediskriminacii pri lingvoj: oni devas elekti unu lingvon aŭ alian en difinita cirkonstanco. Ja ne eblas paroli ĉiujn lingvojn samtempe.

Do, UEA havas duoblan taskon: konvinki la homojn en kaj ĉirkaŭ UN pri la utileco de Esperanto, sed, jam antaŭ tio, konvinki la homojn pri la efektiva ekzisto de aŭtentike bremsaj lingvaj problemoj.

Pro tio, ni dediĉas multan tempon al kunlaboro kun niaj kolegoj en kaj ĉirkaŭ UN por montri al ili, ke la nuna lingva sistemo en UN estas diskriminacia, kaj ke por bone sukcesi UN devas alparoli (kaj aŭskulti) la publikon pere de la lingvoj kiujn tiu publiko parolas. Simple per la povo de ŝtatoj la homaro ne sukcesos solvi siajn nunajn krizojn: neceso kunlaboro de la publiko, de la tielnomata civila socio en la diversaj landoj. Dum ni instigas al multlingvismo, samtempe ni klopodas montri la avantaĝojn de Esperanto – sed unue necesas difini la problemon, por due prezenti la solvon.

#### 4. Reprezentitigo en Novjorko kaj aliaj UN-urboj

La pandemio havis profunde negativan efikon je la rilatoj inter UN kaj neregistaraj organizoj. Multaj aranĝoj en Novjorko kaj Ĝenevo estis nuligitaj, tradiciaj ĉeestaj kunsidoj kaj komitatoj ĉesis funkcii, multaj funkciuloj laboris el siaj hejmoj kaj sekve ne estis troveblaj en siaj oficejoj. Samtempe oni kreis neĉeestajn rimedojn por komunikado, sed ili neeviteble malhelpis la flankan rolon de neregistaraj organizoj kaj de la publiko. Nun, en la postpandemia etoso, oni nur malrapide retrovas la ritmon de la laboro. Feliĉe, en Novjorko la malnova ritmo ja iom post iom revenas, en kombino kun novaj oportunaĵoj neĉeestaj sistemoj. Ŝajnas, ke samo okazas en la aliaj centroj de UN kaj Unesko.

Granda pozitivo por UEA en Novjorko estis la aliĝo de prof. Francis M. Hult al la teamo – homo samtempe aktiva kaj aŭtoritata, kiel universitata fakulo pri lingva politiko kaj lingva edukado. Inter la lastatempaj agadoj menciindas:

- Referaĵoj de Francis M. Hult kaj Humphrey Tonkin ĉe flanka aranĝo de la Altnivela Politika Forumo de UN, pri lingvo en edukado, kune sponsorata de la Delegacio de Hispanio ĉe UN, julio 2022.
- Formala interveno de Francis M. Hult okaze de konsultiĝo kun kandidato por la prezidanteco de la Ĝenerala Asembleo Csaba Kőrösi (kiu poste elektiĝis al tiu posteno), junio 2022 (vidu raporton en la Revuo *Esperanto*, julio-aŭgusto 2022).
- Formala interveno de Humphrey Tonkin okaze de kunsido de la Komitato pri NROj de Ekosok (la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN), novembro 2022.

En Ĝenevo la grupo sub gvido de Cesco Reale ankoraŭ trovas sian vojon, sed ja partoprenis en virtualaj kunsidoj de la Komitato de NROj pri Lingvoj kaj aranĝis virtualajn organizajn kunsidojn kun Humphrey Tonkin. Membro de la ĝeneva teamo Mireille Grosjean modele reprezentis UEA en konferenco pri edukado en Ĝenevo.

En Vieno, reaktiviĝas la Komitato de NROj pri Paco, kie UEA-representanto Alfred Heiligenbrunner rolas kiel vicsekretario.

El Novjorko regule aperadis serio de deklaroj kaj mesaĝoj okaze de specialaj tagoj de UN. UN festas ĉiujare pli ol cent specialajn tagojn, pri granda gamo de memorindaj aferoj – de homaj rajtoj al abeloj, kaj de edukado ĝis agrikulturo. UEA selektis el tiu listo tagojn kiuj iel kongruas kun la laboro por Esperanto aŭ kiuj aparte montras fidelecon al la principoj de UN. Por ĉiu selektita tago, nia teamo produktas specialan deklaron aŭ mesaĝon, kutime malnetigitan de Rafael Lima. Post plia kontrolo de Humphrey Tonkin kaj aliaj, la mesaĝo estas sendita al la Estraro de UEA kaj, kun ties aprobo, aperas kiel Gazetara Komuniko de UEA. La koncerna mesaĝo estas formale transdonita al UN (pere de la Ekonomia kaj Socia Konsilio kaj pere de la Departemento pri Tutmonda Komunikado), kaj sendita al taŭgaj NROj (depende de la temo) kaj al CoNGO. La mesaĝoj ofte aperas ankaŭ en nia informilo. En 2022 mesaĝoj estis publikigitaj por la jenaj tagoj:

- 24 jan. Internacia Tago de Edukado
- 27 jan. Internacia Tago de Memoro de la Viktimoj de la Holokaŭsto
- 21 feb. Internacia Tago de la Gepatra Lingvo
- 8 mar. Internacia Virina Tago
- 15 majo. Internacia Tago de Familioj

- 21 majo. Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo
- 20 jun. Monda Tago de Rifuĝintoj
- 30 jul. Internacia Tago de Amikeco
- 9 aŭg. Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo
- 21 sep. Internacia Tago de Paco
- 30 sep. Internacia Tradukada Tago
- 2 okt. Internacia Tago de Neperforto
- 24 okt. Tago de Unuiĝintaj Nacioj
- 16 nov. Internacia Tago por Toleremo
- 20 nov. Monda Tago de Infanoj
- 10 dec. Internacia Tago de Homaj Rajtoj
- 20 dec. Internacia Tago de Homa Solidareco

La mesaĝoj mem estas klara indiko, ke UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale sekvas la laboron de UN, sed indus trovi vojojn por pli aktive festi tiujn specialajn tagojn ene de la Esperanto-movado.

**Internacia Tago de Edukado**  
#TagodeEdukado  
24 januaro 2022

**Tago de Holokaŭsta Memoro**  
#HolokaŭstaMemoro  
27 januaro 2022

**INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO**  
21-a de februaro 2022  
La internacia lingvo Esperanto respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturan diversecon tra la mondo kaj la uzadon de gepatraj lingvoj en edukado ĉie

**Internacia Tago de Familioj**  
15 majo 2022  
**Paco por la Familioj**

**Monda Tago de Rifuĝintoj**  
#TagodeRifuĝintoj  
20 junio 2022  
**La rajto serĉi sekurecon**  
Kulturoj Lingvoj Rajtoj  
Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo  
21-a de majo 2022  
#KulturaDiverseco

**ESPERANTO**  
Monda lingvo por dialogo, ne por milito  
ESPERANTO-TAGO  
26-07-2022  
Lernu Esperanton, la lingvon de paco  
lernu!  
lernu.net eawikipedia.org

**9 aŭgusto**  
Internacia Tago de la INDIGENAJ POPOLOJ de la Mondo  
#NiEstasIndigenoj

**INTERNACIA TAGO DE PACO**  
21 septembro 2022  
Per paciga lingvo Por paciga vivo

**TRA DU KA DO**  
Internacia Tradukada Tago  
30 SEPTEMBRO 2022  
#tradukadtago

**Internacia Tago de Neperforto**  
#neperforto  
2 oktobro 2022

**Tago de Unuiĝintaj Nacioj**  
24 oktobro 2022  
**Paco kaj Prospero**

**INTERNACIA TAGO POR TOLEREMO**  
#TagodeInfanoj  
16 novembro 2022  
Por ĉiuj infanoj, ĉiuj rajtoj  
**Monda Tago de Infanoj**  
20 novembro 2022

**Tago de Homrajtaj**  
#HomrajtaTago  
10 decembro 2022  
**Digno, Libereco kaj Justeco por ĉiuj**

**Zamenhof-Tago**  
#ZamenhofTago  
Interkompreniĝo kaj Kunlaboro  
**Zamenhof-Tago de la Esperanta Libro**  
15 decembro 2022

## 5. CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN)

Ankaŭ en CoNGO la laboro dum la jaro 2022 (kaj antaŭe) estis interrompata pro la preskaŭa fermiĝo de la UN-domo en Novjorko dum granda parto de la jaro. Kompreneble, se la reprezentantoj de NROj ne venadis al UN, ili ankaŭ ne venadis al la propraj oficejoj en la ĉirkaŭaĵo de UN: regis granda silento. Humphrey Tonkin tenis regulan kontakton, tamen, kun la prezidanto de CoNGO kaj de tempo al tempo interkonsiliĝis kun li pri CoNGO-aferoj. Ekzemple, li reprezentis (virtuale) la organizon (t.e. CoNGO) en la Forumo de la Monda Konferenco pri la Informada Socio, kiu okazis en Ĝenevo en majo 2022. Lia tiuokaza interveno rilatis al la lingva fundamento de komunikado.

UEA estas membro de la Komitato de NROj pri Edukado, sed tiu komitato ne kunvenis dum la jaro 2022.

UEA ankaŭ membras en la Financa Komitato de CoNGO kaj virtuale partoprenis kelkajn kunsidojn de tiu komitato dum la jaro. Humphrey Tonkin reprezentis UEA en du kelktagaj (virtualaj) estraraj kunsidoj de CoNGO en marto kaj oktobro 2022.

Sed la ĉefa evoluo rilate al CoNGO estis la ekagado de la nova Komitato de NROj pri Lingvoj. Tiu Komitato komencis sin laboron jam en la jaro 2021, post aprobo fare de la Estraro de CoNGO. Aliĝis al ĝi iom pli ol dudek neregistaraj organizoj, inter ili la ĉefaj internaciaj organizoj pri tradukado (FIT) kaj interpretado (AIIC). Tuj de la komenco ĝi sukcesis allogi la atenton de ĉefaj rolantoj en UN: ĝia unua malferma kunsido havis kiel ĉefajn parolantojn la Asistan Ĝeneralan Sekretarion de UN pri la aferoj de la Ĝenerala Asembleo – kiu estas samtempe kunordiganto de multlingvismo ĉe UN – kaj la ambasadoron de Bangladeŝo. Aliaj kunsidoj gastigis interalie la Specialan Raportanton pri Minoritataj Aferoj de la Homrajta Konsilio de UN (kies ĉefsidejo estas en Ĝenevo), kaj funkciulojn de Unesko kiuj okupiĝas pri lingvaj programoj, interalie la Jardeko pri Indiĝenaj Lingvoj. Estis elektita kiel prezidanto de la Komitato la reprezentanto de UEA, Francis M. Hult. Estraranoj estas interalie reprezentantoj de la supre menciitaj AIIC kaj FIT kaj la UN-representanto de TEJO, Hans Becklin. La tuta evoluo de la nova Komitato altiris al UEA prestiĝon kiel serioza okupiĝanto pri mondaj lingvaj demandoj, kaj ĝi ebligis daŭran engaĝiĝon en CoNGO je la plej alta nivelo.

Ĉi-lasto aparte gravas ĉar UEA venas al la fino de sia dua trijara periodo kiel estrarano de CoNGO, kaj, laŭ ties statuto, ne tuj rajtas al tria periodo: la statuto preskribas maksimume du kontinuajn periodojn. Sekve, gravos trovi aliajn rolojn por UEA en la kerno de CoNGO.

## 6. Konferencoj pri lingvaj demandoj

Jam de multaj jaroj – fakte ekde la jaro 1983 – UEA kunlaboras por realigi jaran konferencon pri lingvaj demandoj kaj UN. Foje, tra la jaroj, okazis interrompoj, sed de tiam ĝis hodiaŭ certe okazis entute pli ol tridek konferencoj. Organizas ilin tielnomata Esplorgrupo pri Lingvoj kaj UN – grupo kiu konsistas ĉefe el fakuloj pri lingva politiko, en kunlaboro kun funkciuloj kaj diplomatoj ĉe UN, kaj kun aktiva kunlaboro de CED, la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Ili kutime etendiĝas tra unu aŭ du tagoj, sed kelkfoje estas pli ambiciaj. Foje, la referaĵoj aperas en fakaj revuoj aŭ en libra formo. Kelkaj aperis kiel specialaj numeroj de la revuo *LPLP* – kaj en 2023 aperos volumo de kontribuoj de iamaj partoprenintoj en la konferencoj sub la titolo *Language and Sustainability*, kun, interalie, kontribuoj de Mark Fettes, Francis M. Hult kaj Humphrey Tonkin.



Kontraste al la konferenco de 2021, kiu estis virtuale organizita en kunlaboro kun la Universitato Princeton kaj nombris pli ol 500 partoprenantojn, la konferenco en 2022 estis relative modesta virtuala aranĝo tra du tagoj – pri lingvaj efikoj de la pandemio. Ĝi estis aranĝita kunlabore kun la Komitato de NROj pri Lingvoj. Informoj troveblas ĉe [www.languageandtheun.org](http://www.languageandtheun.org).

## 7. Aliaj kunlaboroj kun UN

Gravas mencii la praktikan laboron de UEA kunlige kun la kampanjoj kaj observoj de UN – ne nur en pretigo de Gazetaraj Komunikoj, sed ankaŭ en praktika agado. La Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo en aŭgusto 2023 estis dediĉita al la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj iniciatita de Unesko, kaj tiu temo estis traktita ankaŭ en la novembra Virtuala Kongreso. Gvidis la pritrakton de la temo Mark Fettes, direktoro de CED.

Siaflanke, Trezoro Huang Yinbao, vicprezidanto de UEA ĝis aŭgusto 2022, daŭrigis sian agadon per tradukado kaj laŭtlegado en serio de videoj de la infanlibro *Vi estas mia heroo, Kiel infanoj batalas kontraŭ KOVIM-19*, eldonita de IASC, Inter-Agency Standing Committee, humanitara kunordiga platformo de la UN-sistemo.

## 8. Retejoj kaj sociaj retoj

La retejo [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org) estas bona fonto de informoj pri la laboro de UEA ĉe UN. Ĝi enhavas detalojn pri la laboro en UN, pri la strukturo de UN, pri nia personaro, ktp. Tie troviĝas tradukoj de pluraj ŝlosilaj dokumentoj de UN – paktoj, interkonsentoj k.s. – pretaj por uzo en la Esperanto-laboro. En arkivo estas ĉiuj specialaj mesaĝoj de UEA al UN kaj abunda alia materialo – inkluzive de la dumonataj informiloj en ĉiuj versioj: Esperanta, angla kaj franca. Ĉion ĉi prizorgas kaj ĝisdatigas Rafael Lima. La retejo havas du versiojn – Esperantan kaj anglalingvan. Dum la jaro 2022, la retejo ricevis 21 008 vizitojn de 11 184 vizitantoj.

Rafael Lima prizorgas ankaŭ propran blogon -- <https://unesperante.wordpress.com/>. Tie oni povas trovi informojn kaj opiniesprimojn pri la laboro de UN. La blogo ricevis 1191 vizitojn de 686 vizitantoj kaj diskonigis 34 publikaĵojn. Krom tio, Rafael prizorgas profilojn en sociaj retoj, kun la sama nomo UN Esperante. La ĉefaj estas en Twitter - <https://twitter.com/UNEsperante> - kun 1144 sekvantoj; kaj Instagram - [https://www.instagram.com/un\\_esperante](https://www.instagram.com/un_esperante) - kun 541 sekvantoj.

Jon Liechty, iama prizorganto de la oficejo de UEA en Novjorko, kiu nun loĝas en alia regiono de Usono, prizorgas Facebook-paĝon pri UN-aferoj (nomo: UN kaj Internaciaj Aferoj) – paĝon kiu meritas pli da atento de esperantistoj ol ĝi nun ricevas. En decembro 2022 ĝi havis 923 sekvantojn sed relative malmultajn afiŝojn. Espereble ĝi fariĝos pli konata kaj sekve pli ofte uzata.

## 9. Informilo

La informilo de UEA pri UN-aferoj aperadas sesfoje jare jam de multaj jaroj: ĝi jam aĝas pli ol dek jarojn de kontinua aperigo kaj nun atingis 62 numerojn. Redaktas ĝin Humphrey Tonkin en la angla kaj Esperanto; Gilles Tabard tradukas ĝin en la francan. Rafael Lima donas redaktan helpon, kaj la informilo mem, en la formo de titoloj kiuj ligiĝas al la retejo, aperas rete fare de Sofiya Soskina kaj kun



okaza helpo de Ulrich Becker. Ĝi estas vaste distribuata rete al kontaktoj en la Esperanto-movado, en UN, en NROj, kaj aliloke.

## 10. Oficejo kaj financoj

Jam de jaroj UEA havas oficejon en la tielnomata Eklezia Centro (Church Center) tuj trans la strato de la UN-Domo. La domo estas ekskluzive okupata de plej diversaj neregistaraj organizoj, inkluzive de CoNGO. La termino “oficejo” estas eble troblovita nomo por angulo de ĉambro kie UEA havas skribotablon kaj dosieran ŝrankon – sed tio sufiĉas por la tujaj bezonoj de niaj reprezentantoj ĉe UN. La aranĝo liveras al ni ne nur proksiman kontakton kun aliaj NROj sed ankaŭ prestiĝan adreson – kaj aliron al kunvenejoj en la sama konstruaĵo. La relative malalta lupago estas financata de kontribuoj de niaj subtenantoj kaj de subvencio al UEA flanke de Esperantic Studies Foundation (ESF), kies direktoro, Chuck Mays, aktive kunlaboras kun ni.

Indus aldoni, ke financa helpo venas ankaŭ rekte de UEA, kies fondaĵo UN, subtenata de unuopaj donacantoj al UEA, helpas kovri administrajn kaj aliajn kostojn – kaj al kiu ĉiu leganto de tiu ĉi raporto rajtas kontribui...

## 11. Perspektivoj

La laboro por konvinki UN pri la valoro de Esperanto estas malfacila sed esenca: se ni ne kredas je nia lingvo, ni ja ne konvinkos aliajn – kaj se ni ne per nia ĉeesto kaj demonstro montras la funkcipovon de Esperanto, neniuj aliaj faros. Sed krei kaj daŭrigi nian aktivan ĉeeston ĉe Unuiĝintaj Nacioj ne okazas spontane kaj per si mem: ĝi postulas kunlaboron de tuta aro da kolegoj kune laborantaj efike, pozitive, kaj regule. Ni konstante bezonas helpon, kunlaboron, pretecon dediĉi sin al praktika laboro. Ni estas tre feliĉaj, tre bonŝancaj, ke ekzistas la nuna teamo; tamen ni daŭre serĉas pliajn kunlaborantojn.

Unuiĝintaj Nacioj estas la plej bona ekzemplo de plene internacia interŝtata organizo kiu klopodas fari sian laboron en multlingva ĉirkaŭaĵo. Ĝi funkcias multe pli bone se ĝi havas pli racian kaj raciigitan sistemon de lingvouzo. Neeviteble, la esperantistoj devas dediĉi al ĝi sian atenton – sed ne per naivaj pledoj por la Dekses Reguloj aŭ la Fina Venko, sed per rigora analizo de ĝia labormaniero rilate lingvojn kaj de la potenciala rolo de Esperanto. Tio restu kerna al nia laboro.

Ni dankas al tiuj multaj homoj kiuj dediĉas sian tempon, sian monon kaj sian entuziasmon al la laboro por Esperanto ĉe UN!

## 12. La Teamo

Allessio, Sacha Giordano  
 Becker, Ulrich  
 Bennett, Anna  
 Boytcheva, Zdravka  
 Corsetti, Renato  
 Favre, Alain

Fettes, Mark  
Florineth, Norina  
Grosjean, Mireille  
Heiligenbrunner, Alfred  
Hult, Francis M.  
Kesler, Nathalie  
Liechty, Jon  
Lima, Rafael  
Loison, Didier  
Lo Jacomo, François  
Maertens, Rakoën  
Maitzen, Hans-Michael  
Margot, Nicole  
Maurelli, Francesco  
Mays, Chuck  
Reale, Cesco  
Soskina, Sofija  
Spanò, Sara  
Tabard, Gilles  
Tanner, Adrian  
Tonkin, Humphrey  
Triolle, Renée

Raportis:

**François Lo Jacomo**, estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj, reprezentanto ĉe Unesko  
**Humphrey Tonkin**, reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Februaro 2023